Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 4an de novembro 2010 per Skype.

(Aprobita la 9an de decembro 2010.)

Partoprenis:

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Ulf Lunde en Os
Anne Karin Bondhus en Bryne
Asbjørn Lindh en Oslo
Ingebjørg Rambjør en Bergen
Eli Fitjar en Bergen

0. Tagordo

Aprobita.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 9an de septembro 2010

La protokolo estis aprobita.

2. Ekonomio

Skagen vekst: 35403
Skagen høyrente: 58221
Høyrente kreskis iomete. Vekst preskaŭ kiel en majo.

3. Esperantonia

En 2008 NEL ofertis al la Oslo-klubo, ke tiu ricevu 60% de ĉiuj luig-enspezoj de Esperantonia, dum la Ligo ricevu 40%, ĉar la Oslo-klubo faras la praktikajn aranĝojn pri luigado. La aranĝo validis en 2008 kaj 2009, kaj ni ankaŭ decidis rekonsideri la aranĝon post la fino de la periodo.

La estraro de NEL decidis daŭrigi la aranĝon por 2010 kaj 2011.

4. Biblioteko

Nia biblioteko tuj estos for de Hamar. Multaj libroj kaj periodaĵoj sendiĝis al la Nacia Biblioteko en Mo i Rana, multajn duoblaĵojn oni sendis al interesiĝantoj (anstatŭ forĵeti ilin), dum la plej gravaj libroj ktp. estas stokitaj en Esperantonia.

Pri la laboro en Hamar okupiĝis Douglas Draper, Espen Stranger Johannesen kaj Sverre Opsahl, kaj Cato Haugen multe laboris pri la transporto kaj pri la stokigo en Esperantonia. Pri stokigo laboris ankaŭ Kjell Peder Hoff. Ni kore dankas.

5. Seminario

Ni rezignas pri seminario en 2010. La kapacito de la estraranoj suferis precipe pro malsano, sed ankaŭ pro laboro kaj aliaj privataj aferoj, kaj ni agnoskas ke ni devas uzi niajn limigitajn fortojn por preparado de la Landa Kongreso en 2011.

6. Eventualaĵoj

Nenio.

La interkonsiligho daüris inter 19.30 – 20.45.

La venonta interkonsilgho estos la 9a de decembro je la 19.30.

Raportis
Ingebjørg Rambjør.